

Neŭtrala esprimado en Esperanto

Versio: 2017.11, alfa

Jam dum almenaŭ 30 jaroj daŭras la diskuto pri ebloj de seksneŭtrala¹ esprimado en Esperanto. La diskuto foje estis riĉiga, foje dogma kaj ofte oni devas ĉiam klarigi la samajn faktojn. Ofte la diskuto traktas jam preparolitajn aferojn dum kiam la novajn oni preterlasas kaj ofte la diskuto simple restas sen pliriĉigo.

Pri la neceso havi la eblecon neŭtrale paroli pri kaj al homoj ne necesas longe diskuti. Tiu bezono ekzistis ĉiam kaj ankaŭ pro ĝi naskiĝis Esperanto.

En Eŭropo de la 19-a jarcento ZAMENHOF (kaj aliaj) sentis la neceson havi eblecon de neŭtrala esprimado pri kaj al homoj de diversaj lingvoj, landoj kaj religioj. Plejmulto de la tiama kaj tiea socio estis regata de viroj, sed inoj ricevadis pli kaj pli da spaco en la socio ĝis aperis nova neceso pri neŭtrala esprimado, kiu inkludus ankaŭ inojn, ne nur virojn. Ankoraŭ kelkaj jaroj pasis kaj la ĝenerala socio malkovris ekziston de samseksemuloj kaj transseksuloj kaj denove aperis novaj ideoj pri neŭtrala esprimado. Post pliaj jaroj socio malkovris ankaŭ la ideon de socia sekso kaj de neduuma sekso (sekse identigo nek vira nek ina).

Kompreneble tiu ĉi evoluo ne okazis tutmonde samrapide. Sed same kiel ĝi trafas unuopajn landojn, ĝi iom post iom eniras kaj influas ankaŭ Esperantujojn. Kaj ankaŭ kompreneblas, ke tiu ĉi evoluo ne nepre estas finita – novaj malkovroj en scienco kaj teĥniko same kiel tiuj en la socio povos alporti novajn ideojn kaj praktikojn en la kampon de persona identeco aŭ de identeco ĝenerala.

Ludoviko Lazaro ZAMENHOF kompreneble ne povis antaŭvidi tiun ĉi evoluon, samkiel mi ne povas antaŭvidi nun la estontecan, sed tio ne signifas, ke li kreis lingvon nekapablan de evoluo. Estas interese ke kelkaj trajtoj de neŭtrala esprimado, inklude tiujn rilatajn al sekso, estis en Esperanto solvitaj jam en 1892, dum kelkaj bezonis pli da tempo por hejmiĝi inter esperanistoj kaj eble kelkaj ankoraŭ ankoraŭ devas batali por sia akceptiĝo.

Tio ne signifas, ke neŭtrala komunikado devas esti dogmo, laŭ kiu ni agu 24-hore tage. Ne ĉiam oni devas esti perfekte neŭtralaj. Dum publika parolo antaŭ dum UK por mi eble sufiĉas nur ĝenerala kaj neŭtrala "preĝejo", sed iam la diferenco inter "preĝejo" kaj "kirko" povas esti necesa kaj valora. **Foje persona sincera respekto al aliaj homoj povas esti pli grava ol pedanta uzado de perfekta lingvaĵo.** Ĉefe en la Lingvo Internacia.

Tezoj

La tuta artikolo estos skribita en kongruo kun jenaj bazaj asertoj – tezoj:

Lingvo ne estas ĉiosava, ĝi mem ne diskriminacias nek subtenas diskriminacion

Lingvo mem estas komunikilo, ĝi mem ne kapablas pensi aŭ agi. Ĉiu unuopa homo mem respondecas pri siaj agoj.

¹ Ĉiam, kiam mi mencias la vorton „sekso“ sen precizigo, mi celas aŭ biologian aŭ socian sekson (la dua estas ofte nomata „genro“) depende de tio, kion la leganto konsideras esti pli grava por sia esprimiĝo.

Mi ne trovis ajnajn pruvojn ke neekzisto de gramatika genro aŭ iu aparta genroesprimilo en iu lingvo grandparte influas agadon de la popolo, kiu posedas ĝin. Nek mi trovis pruvojn ke malegaleco inter seksoj estus pli granda en popoloj, kie regas lingvo, kiu havas gramatikajn genrojn aŭ aliajn genroesprimilojn.

Lingvo, kiu ne havas kaj ne esprimas gramatikan genron estas ekz. la hungara. Sed male en Germanio estas altnivela konscio pri egaleco de viroj kaj inoj kaj ekcepto de seksaj kaj aliaj minoritatoj dum la germana mem havas tri gramatikajn genrojn, kiuj esprimiĝas per deklinaciado de substantivoj kaj adjektivoj kaj per singularaj triapersonaj pronomoj.

Fine, se ni akceptus ideon, ke lingvo estas seksisma pro tio, ke ĝi ebligas al mi esprimi seksismajn pensojn, do ni nomu la lingvon ankaŭ perforta, rasisma kaj kontraŭjudisma, ĉar ĝi ebligas al mi esprimi tiajn pensojn.

Tasko de la lingvo ne estas juĝi evoluon, sed peri komunikadon.

Mi supozas, ke plejmulto de la esperantistoj konsentos kun tio, ke Esperanto devas komforte servi por komunikado inter ĉiaspecaj homoj sendepende de nia persona opinio pri tiuj homoj.

Lingvon oni ne regu per emocioj, sed per racio kaj logiko

Emocioj rilatas al nia interna travivado, sed interna travivado povas rapide ŝanĝiĝi. Pro tio emocioj povas esti bonaj instigiloj por fari ion aŭ okupiĝi pri io, sed ne por regado de lingvo – sistemo, kiun kredas miloj kaj pli da homoj, por ke ili komprenu unu la alian.

Logiko helpas al ni solvi problemojn. Surbaze de tio, kion ni jam scias, ni povas ricevi ian rezulton – tute novan scion, eble ankaŭ solvon. Kontraŭe al emocioj, se oni ĉiam havas la saman komencan scion, oni ricevos ĉiam plimalpli saman rezulton. Tio jam nature estas pli firma bazo por regado de lingvo.

Fundamento estas bazo de Esperanto

Fundamento estas foje rigardata kiel dogmo, kiu malhelpas al ni efike solvi problemojn en Esperanto. Sed Fundamento ne nomiĝas Fundamento hazarde. Ĝi estas vera bazo (ankaŭ laŭ PMEG, 2017), difino kaj kerno de la lingvo Esperanto. Se iu demandas vin "Kio estas Esperanto?" vi povas montri al ĝi Fundamenton kaj diri: "Tio ĉi kaj multe pli."

Se mi devus kompari ĝin al io reala, tiam mi elektus turon de urbodomo en mia devenurbo. Ĝi estas konstruita super rivero kaj servas kiel ponto kuniganta diversajn esperantistojn, sed samtempe ĝi estas turo de la tuta lingvo: Fundamenta vortaro, oficialigita vortaro (per Oficialaj Aldonoj, kiujn eldonas Akademio de Esperanto), oficialeca vortaro (en vortaroj agnoskataj kiel "normigaj", ekz. PIV aŭ ReVo) kaj neoficiala vortaro kaj neologismoj.

Danke al tio ekzistas sistemo, kiu ebligas komunan interkompreniĝon de Esperantistoj kun diversaj aliroj kaj lingvouzoj (ekz. "bonlingvistoj" kaj "mavlingvistoj" – du skoloj de Claude PIRON kaj Jorge CAMACHO pri kontraŭstarantaj aliroj al uzo de neologismoj en Esperanto) kaj samtempe uzi kaj evoluigi la lingvon same kiel ĉiun alian – kun riĉaj vortaro kaj kulturo.

Se Esperanto ne havus tiun ĉi firman grundon, kiel vi rekonus, ke vi daŭre parolas Esperanton kaj ne Idon aŭ alian esperantidon? Kion alian havus komunan mia artikolo kun verkoj de ZAMENHOF, Piron aŭ Camacho? Eĉ Akademio mem rifuzas servi kiel bazo de Esperanto anstataŭ Fundamento aŭ ŝanĝi la Fundamenton.

Verŝajne tiu ĉi afero estas ege nekutima eĉ por esperantistoj (ĉefe novaj, inklude min), ĉar por naturaj lingvoj la popolo estas ilia Fundamento dum ĉe Esperanto tio estas dokumento.

Fundamento tamen ne estas malliberejo, sed kiam oni enkondukas kontraŭfundamentan ŝanĝon, oni fakte kreas novan dialekton aŭ lingvon (depende de la grandeco de tiu ŝanĝo) – esperantidon. Ĉiu kompreneble rajtas fari tion, sed tia lingvo ne plu estas Esperanto.

Neŭtrala esprimado en Esperanto estas afero de lingvouzo

Montri tion estas fakte celo de tiu ĉi artikolo. Esperanto jam enhavas manierojn, kiuj ebligas al ni paroli neŭtrale.

Se tiaj eblecoj ekzistas, do kial homoj ne uzas ilin? Tio povas esti pro jenaj kialoj:

- homoj ne scias pri tiu ĉi lingvouzo
- homoj scias pri tiu ĉi lingvouzo, sed ne volas uzi ĝin.

Forigi la unuan kialon estas sufiĉe "facile" – per edukado kaj klarigado. Homojn el la dua parto ni povas konvinki, sed la fina decido estas ĉiam ĉe ili mem. Ekscii, ĉu la neuzo de la jam ekzistantaj manieroj fontas el nescio aŭ vera nekomforteco postulus plian esploron.

Vortaro

La plej facila parto estas tiu rilata al vortaro. Ĉar Esperanto ne havas gramatikan genron, la sekseco de la vorto povas esti markita nur per ĝia signifo. Bonŝance plejmulto de la vortoj, ankaŭ tiuj rilataj al personoj, estas laŭsignife senseksaj (ekz. bovo, kapro, najbaro, kaj ĉiuj vortoj kun -an-, -estr-, -id-, -ist-, -ul-, -int-, -ant-, -ont-, -it-, -at-, -ot-). Nur signifa malplimulto da ili estas specife seksaj – aŭ vire (ekz. edzo, taŭro, gejo, kaj ĉiuj vortoj kun -ĉj- kaj vir-) aŭ ine (ekz. damo, amazono, lesbo, kaj ĉiuj vortoj kun -nj- kaj -in-). Tion konfirmas PMEG (2017), KRAMER (2014), BORMANN (1980), DEL BARRIO (2004) kaj BROSCH (2015).

La bazajn formojn de tiuj seksneŭtralaj vortoj oni povas uzi rilate al ajna sekso aŭ persona identeco. Pro la uzo de Esperanto dum pasintaj jardekoj kaj pro influo de naciaj lingvoj, multaj homoj miskomprenas ilin kiel esti baze virsignifaj kaj insiste aldonas -in-, se temas pri inoj. Malgraŭ tio, ke -in- ĉi tie ne estas deviga, sed volonta emfazo de ineco, surbaze de la vaste akceptata principo de sufiĉo kaj neceso, oni tute ne bezonas uzi ĝin rilate al tiuj ĉi vortoj se tio estas nenecesa. La inecon eblas ankaŭ marki per persona pronomo, per adjektivo aŭ la komunikantoj jam scias pri ĝi, aŭ ĝi tute ne gravas. La samo kompreneble validas ankaŭ rilate al uzo de antaŭafikso vir- aŭ eventuala nova postafikso -iĉ-.

La kialoj por havi vortojn kun specifa seksa signifo povas esti pluraj – ĉefe povas temi pri signifa nuanco (ekz. „taŭro“ kaj „guno“ rilate al ĝenerala „bovo“, „gejo“ kaj „lesbo“ rilate al ĝenerala „samseksemulo“) aŭ pro historiaj kialoj kiam certaj okupoj estis objekte prizorgataj de homoj de certa sekso (emiro, geĵo, ŝoguno, papo). Tiu ĉi aro de seksaj vortoj estas konservindaj, ĉar ili priskribas apartan signifan nuancon rilate al iu fako, tempo kaj/aŭ regiono.

Dua parto de seksaj vortoj estas tia, kiu estis difinita de ZAMENHOF kiel baze vira, sed tiu „baza vireco“ ne plu estas aktuala. Universala Vortaro (parto de Fundamento) difinas tiujn ĉi vortojn per iliaj ekvivalentoj en la franca, angla, germana, rusa kaj pola, kie tiuj vortoj havas viran signifon ĝis hodiaŭ. Ankaŭ por havi limigitan vortprovizon utilis havi ilin kiel bazo, kaj incecon aparte marki.

Por kelkaj el ili oni povas jam nun trovi en Esperanto senseksajn ekvivalentojn, dum por kelkaj eblas enkonduki novajn neŭtralajn vortojn tie, kie ili mankas (ekz. „*parento*“ por „*gepatro*“) kaj eventuale ankaŭ trovi novajn vortojn por necesaj bazaj inaj ekvivalentoj de la pure viraj (ekz. „*princeso*“ por „*princino*“). Alprenado de novaj vortoj por konceptoj, kiuj ankoraŭ ne havas sian taŭgan esprimblecon en Esperanto estas tute laŭregula ago kaj ilia oficialigo dependas de ilia adopto fare de la esperantistaro mem.

Sube mi prezentas kelkajn proponojn de novaj baze sekssignifaj aŭ insignifaj vortoj kiel ekvivalentoj al tiuj, kiuj nuntempe estas baze virsignifaj. Kurzivaj vortoj markas proponojn de Cyril BROSCH, Marcos CRAMER aŭ de mi, dum la nekursivaj vortoj estas tiuj el Fundamento, Akademia vortaro, PIV aŭ ilia deriviĝo.

Vira	Ina	Neŭtrala
abato	?	monaĥejestro, konventestro, (<i>klostrestro</i>)
avo	<i>avjo</i>	<i>praparento</i> , pragenerinto, <i>nonno</i> , <i>avilo</i>
caro	<i>carico</i>	imperiestro, monarĥo, carlandestro
duko	<i>duĉeso</i> , <i>dukeso</i>	duklandestro, monarĥo
edzo	<i>vifo</i>	vivpartnero, vivkunulo, <i>spozo</i> , <i>ajreno</i>
frato	<i>ŝestro</i>	<i>siblingo</i> , <i>saŭdaro</i>
fianĉo	<i>brajdo</i>	geedziĝonto, svatiĝinto, nuptonto, <i>spoziziĝonto</i> , <i>ĥatibo</i>
filo	<i>dotro</i>	infano, <i>filjo</i> , <i>zio</i>
fraŭlo, <i>fraŭliĉo</i>	<i>nubilo</i>	<i>nespozo</i>
gejo	lesbo	samseksemulo
grafo	<i>konteso</i>	landestro
ĝentlemano, sinjoro	damo, <i>madamo</i>	estimato, (<i>ŝrimo</i>)
knabo, bubo	<i>girlo</i> , <i>saputelo</i>	junulo, infano
kuzo	<i>kusino</i>	<i>zifiljo</i> , <i>itoko</i>
masklo	femalo	estaĵo, vivaĵo, besto
monaĥo	<i>nono</i>	monaĥejano, konventano, (<i>klosterano</i>)
nepo	<i>nieto</i>	<i>nipoto</i> , <i>ĝukuo</i>
nevo	<i>nico</i>	<i>siblingofiljo</i> , <i>ŝengo</i>
onklo	<i>aŭnto</i>	<i>zio</i> , <i>oako</i>
patro	matro	<i>parento</i> , generinto, <i>pao</i>
princo	<i>princeso</i>	regnestrado
plezursinjoro	putino	amoristo
reĝo	<i>regino</i>	regnestro, monarĥo

vidvo	<i>vidovo</i>	<i>viduo, ĝano</i>
viro, malino, <i>iĉo</i>	ino, virino, femino, <i>femo</i>	homo, persono, plenkreskulo, adolto

La tabelo kompreneble ne servas kiel dogmo, nur montras jam faritajn proponojn kaj eblan direkton por serĉi neŭtralajn vortojn. Alprenado de novaj vortoj el grandaj neeŭropaj lingvoj povus samtempe helpi al pliinternaciigo de la esperanta vortaro. Ĉiukaze, ĉar tiuj vortoj devus servi por priskribi ĉiutagajn homajn rolojn, ili devas esti facile memoreblaj kaj prononceblaj. Tiam mi ekzemple persone ne ŝatas kelkajn proponojn de BROSCH kiel samtempa „nonno“ („geavo“) kaj „nono“ („monaĥino“). Sed la finan decidon ne faras mi aŭ iu alia persono aŭ grupo, sed la komunumo de aktivaj uzantoj. Kaj tiel povas esti eĉ aliaj proponoj eblaj.

Ĉi tie montriĝas, ke por sufiĉe granda parto de la seksaj vortoj eblas jam nun trovi en Esperanto neŭtralajn samsignifajn esprimojn – ekz. konventestro anstataŭ abat(in)o, samseksemulo anstataŭ lesbo/gejo, junulo/infano anstataŭ knab(in)o, ktp. Tial estas neutile strebi pri la origina uzo de postafikso -iĉ- (prezentata ekz. en Riisma Esperanto, 1994), kiu per neŭtraliigo de ĉiuj radikoj elirus el Universala Vortaro en Fundamento kaj tiel kreus novan esperantidon. La aro de vortoj pro kiuj indas tion fari estas multe pli malgranda ol la ŝanĝo mem inklude perdon de la nuancoj priskribitaj supre. **Krome ĝi neeviteble gvidus al absurdaj konkludoj, ekzemple ke "masklo", "femalo", "viro" kaj "femino" (kiuj ĉiuj troviĝas en PIV) iĝus samsignifaĵoj.** Kompreneble tion neniel malpravigas strebon pri enkonduko de postafikso -iĉ- kiel ekvivalento de postafikso -in- kun laso de la radikoj en nuna stato.

Personaj pronomoj

Pli neklara kaj pli emocia estas kutime la diskuto pri ununombraj triapersonaj pronomoj. Fundamento mem ilin nur listigas kune kun iliaj ekvivalentoj en koncernaj naciaj lingvoj. Nura rimarko aperas ĉe la pronomo "ĝi", ke ĝi estu uzata por bestoj kaj aĵoj.

Esperanto	la franca	la angla	la germana	la rusa	la pola
li	il, lui	he	er	онъ	on
ŝi	elle	she	sie	она	ona
ĝi	il, elle (pour les animaux ou les choses)	it	es (von Thieren oder Sachen)	оно (о вещи или о животномъ)	ono (o rzeczy lub zwierzęciu)

Rimarkindas ke en ĉiuj tri lingvoj, kiuj uzas difinitan artikolon (nome la franca, la angla kaj la germana) ZAMENHOF skribas pri pronomoj kiel pri "la personaj pronomoj" ("Les pronoms personnels", "The personal pronouns", "Die persönlichen Fürwörter"), kio estas komprenata kiel signo de kompleto de la listo. (KRAMER, 2014 kaj BROSCH, 2015) "Ci", kiu aperas en la Universala Vortaro, tiurilate estas komprenata kiel aldonaĵo al la lingvo por kazo de bezono de markiteco de singularo en dua persono.

Laŭ tio videblas, ke kompleta estas la aro de bazaj personaj pronomoj, dum kiam aldono de novaj teorie eblas (kiel "ci"), sed kompreneble tia aldono devus esti vere necesa kaj nekonfuziga. Aliaĵe tia aldono estus ne nur senseca, sed ankaŭ malhelpa por interkompreniĝo.

ZAMENHOF klarigis siajn intencojn pri personaj pronomoj sufiĉe frue en siaj Lingvaj Respondoj:

"La pronomoj «li» kaj «ŝi» estas uzataj nur por personoj; por aferoj, objektoj kaj ankaŭ por bestoj ni uzas la pronomon «ĝi», ĉar en tiaj okazoj la sekso ne ekzistas. Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran aŭ virinan), tiam ni povas uzi «li» kaj «ŝi»." (Esperantisto, 1892)

"En ĉiu lingvo ĉiu vorto havas (tute ne logike) difinitan sekson, kaj tial, uzante por ĝi pronomon, ni prenas tiun, kiu respondas al la gramatika sekso de la vorto (tial la franco diras pri infano «il», la germano diras «es»); sed en la lingvoj angla kaj Esperanto la vortoj havas nur sekson naturan, kaj tial, parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj, kies naturan sekson ni ne scias, ni vole-ne-vole (sen ia ofenda intenco) uzas pronomon mezan inter «li» kaj «ŝi» — la vorton «ĝi». Tiel same ni parolas ankaŭ pri «persono». Cetere, parolante pri infano, pri kiu ni scias, ke ĝi ne estas knabino (aŭ almenaŭ ne scias, ke ĝi estas knabino), ni povas uzi la vorton «li»." (Esperantisto, 1893, mallongigita)

"Kiam ni parolas pri homo, ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon «ĝi» (kiel ni faras ekzemple kun la vorto «infano»), kaj se vi tiel agos, vi estos gramatike tute prava. Sed ĉar la vorto «ĝi» (uzata speciale por «bestoj» aŭ «senvivaĵoj») enhavas en si ion malaltigan (kaj ankaŭ kontraŭkutiman) kaj por la ideo de «homo» ĝi estus iom malagrable, tial mi konsilus al vi fari tiel, kiel oni faras en la aliaj lingvoj, kaj uzi por «homo» la pronomon «li». Nomi tion ĉi kontraŭgramatika ni ne povas; ĉar, se ni ĉiam farus diferencon inter «homo» kaj «homino», tiam ni devus por la unua uzi «li» kaj por la dua «ŝi»; sed ĉar ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon, kiam ni parolas ne speciale pri sekso virina, ni povas uzi la viran formon por ambaŭ seksoj (ekzemple «homo» = homo aŭ homino, «riĉulo» = riĉulo aŭ riĉulino k.t.p.), per tio mem ni ankaŭ interkonsentis, ke la pronomon «li» ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta. Se ni volus esti pedante gramatikaj, tiam ni devus uzi la vorton «ĝi» ne sole por «homo», sed ankaŭ por ĉiu alia analogia vorto; ekzemple ni devus diri: «riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al «ĝi» (ĉar ni parolas ja ne sole pri riĉaj viroj, sed ankaŭ pri riĉaj virinoj)." (La Revuo, 1901)

"La vorton «ĝi» ni uzas, kiam ni parolas nek pri viro, nek pri virino, sed pri io, kio ne havas sekson aŭ kies sekso estas por ni nekonata aŭ indiferenta" (La Revuo, 1907, mallongigita)

"Kiam oni parolas pri bestoj, mi konsilas ĉiam uzi nur la senseksan pronomon «ĝi», — ne sole kiam (en la plimulto da okazoj) la sekso de la priparolata besto estas por ni indiferenta, sed eĉ en tiaj okazoj, kiam ni parolas precize pri la sekso de la besto. En la tre maloftaj okazoj, kiam la precizeco povas nepre postuli, ke ni montru la sekson de la besto per la uzata pronomo, la teorio ne malpermesas al ni uzi la vorton «li» aŭ «ŝi»; sed en ĉiuj ordinaraj okazoj mi konsilus uzi la pronomojn «li» kaj «ŝi» nur por homoj." (La Revuo, 1908)

El tio ŝajnas ke ZAMENHOF jam dekomence planis pronomojn tiel ke "li" havu virseksan signifon, "ŝi" havu ineksan signifon kaj "ĝi" havu senseksan signifon. La rimarkoj apud "ĝi" en Fundamento ne estas reguloj, sed gvidiloj – ili aperas nur en la lingvoj, kiuj distingas gramatikan genron ĉe ĉiuj siaj vortoj – eĉ tiuj pri aĵoj aŭ specioj. Danke al tiu gvidilo estas klare, ke oni ne faru distingon ĉe aferoj, kiuj ne havas sekson en si mem. Ekzemple por germanlingvanoj seĝo estas "li", tero estas "ŝi", por poloj kaj rusoj tablo estas "li", atmosfero estas "ŝi". En Esperanto tiuj aferoj ne havas gramatikan genron, tial ili estas "ĝi".

Ĉe bestoj estas simile. En la "fundamentaj" lingvoj (krom la angla), sian gramatikan genron havas diversaj specioj. En la germana lupo aŭ hundo kiel specio estas "li", kato estas "ŝi". Simile estas en la franca, rusa kaj pola. Por homoj ĝenerale ne gravas ĉu iu hazarda kato, hundo, ĉevalo aŭ eĉ

infano (ĉe beboj foje malfacile rekoneblas sekso) estas viro aŭ ino, do pro tio estas nature uzi por ili la pronomon "ĝi". Sed la sistemo neniel (kaj ZAMENHOF tion konfirmas) malebligas vin marki la sekson kiam vi konas ĝin aŭ kiam ĝi estas grava – ekz. ĉe via propra ŝatata kato, hundo, ĉevalo (do individua, ne ĝenerala besto) aŭ ĉe infano. Dum kiam ĉe bestoj kaj infanoj oni lasis eblon ĉu marki sekson, ĉe homoj en tiama socio estis la normo ĉiam scii la sekson. Tio estis verŝajna kialo por naskiĝo de tio, kion oni poste interpretis kiel "homa markiteco".

Kial do oni rekomendis uzon de "li" ĉe homoj ĝenerale? Denove temas pri historio. En Eŭropo de la 19-a jarcento kaj komenco de la 20-a jarcento ne nur estis nature, ke viroj havis pli gravan rolon en la socio, sed ankaŭ uzi "li" por ĝeneralaj homoj estis nature en ĉiuj el la "fundamentaj" lingvoj (inklude la anglan; ĝi kompreneble havis ankaŭ tradician uzon de la pronomo "they", sed tiutempe ĉefa ĝenerala triapersona pronomo por homoj estis "he"). Tio estis pli nature por tiamaj homoj, kiuj rapide transprenis tian sistemon, kaj tio estas la "silenta interkonsento" pri kiu skribis ZAMENHOF en unu el la Respondoj.

Kompreneble ni povus daŭre uzi "li" kaj eĉ ne uzi "ŝi" krom se tio necesus kaj tiel "senvirigi" la pronomon "li". Tio estus maniero natura rilate al la ĝisnuna lingvouzo. Sed la feminisma movado ekde la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj daŭre konfirmis ĝian virseksecon kaj la serĉado de alia pronomo komenciĝis.

Se ni do ne volas uzi la pronomon "li" por ĝeneralaj homoj pro ĝia virsekseco, do estas nature turniĝi reen al la origina kaj celita lingvouzo kun la "senseksa" pronomo "ĝi", kiel ZAMENHOF mem nomis ĝin. (Notindas, ke do Esperanto havas senseksan triapersonan singularan pronomon jam ekde 1887.) Sed ĉar la liisma lingvouzo ja troviĝas ankaŭ en la Fundamenta Ekzercaro, ĝi restos valida por ĉiam, kio kompreneble ne malpermesas al ni utiligi alian lingvouzon en la ĝenerala lingvo.

Ĝenerala konfuzo pri la uzo de "ĝi" verŝajne fontas el la imago, opinio aŭ kredo, ke la pronomo "ĝi" estas besta kaj aĵa, do ne senseksa, pro reguleca aliro al la pli frue menciita gvidilo en Fundamento kaj ankaŭ pro la praktikaj kazoj, kiam ĝi ĝis nun estis uzata. Sed se sufiĉa kvanto da homoj decidis turniĝi for de la "liisma" lingvouzo, do ne ekzistas kialo por ke ili daŭrigu ĝin en tiu ĉi specifa afero de "nehomeco".

Per reveno al senseksa "ĝi" oni ankaŭ estigas seksan simetrian ĉe pronomoj, kiun originaj riistoj kaj iĉistoj konsideras esti bona eco ĉe seksa esprimado.

Esperanto			Riismo			Iĉismo		
li	ĝi	ŝi	li	ri	ŝi	-iĉ-	<radiko>	-in-
vira	neŭtrala	ina	vira	neŭtrala	ina	vira	neŭtrala	ina

La ĉefa diferenco de riismo (krom la pronomo mem) do restas nur ĉe markiteco de personeco aŭ homeco. Ĝis nun mi ne trovis bonan argumenton kial insisti pri la ĉiama diferencado inter bestoj/aĵoj/infanoj kaj homoj/personoj/neinfanoj. Kontraŭe al tio, mi trovis plurajn kialojn por ne insisti pri la markiteco de homeco aŭ personeco.

Unu el la pli facile solveblaj kontraŭargumentoj estas tiu, ke ĝiismo povas esti konfuziga ĉe frazoj kiel "Prezidanto de organizo plenumas taskojn, kiuj estis postulitaj al ĝi". Vere tiel kiel la frazo estas skribita ne klaras ĉu la taskoj estas postulataj al la organizo aŭ al la prezidanto. Sed tiu ĉi specifa kazo ne povas servi kiel valida argumento kontraŭ la tuta sistemo. La argumento antaŭvidas, ke dum la ŝanĝo de la lingvouzo, oni ŝanĝu nur la pronomon kaj nenion alian. Sed dum la ŝanĝo de lingvouzo, oni ŝanĝu la lingvouzon, ne nur unu pronomon. Tiam la ĝusta transprenado estas

"Prezidanto de organizo plenumas taskojn, kiuj estis postulitaj al la prezidanto," aŭ "Prezidanto de organizo plenumas taskojn, kiuj estis postulitaj al la organizo." Eĉ pli ridinda estas tiu argumento kiam ni konscias ke similajn konstruojn ni povas konstrui kaj en riisma kaj en liisma lingvouzo: "Petro plenumas taskojn de Adamo, kiuj estis postulitaj al li/ri."

Jam pli serioza kontraŭargumento estas tiu, ke la pronomo "ĝi" jam estas ligita al bestoj kaj aĵoj kaj do pro tio ĝi havas tiajn konotaciojn, kiuj estas komprenataj kiel malestimigaj aŭ eĉ ofendaj. Estas interese ke dum kiam ekzistas ankaŭ aliaj vortoj pro ilia laŭgramatika signifo kaj ĝenerala lingvouzo kunligitaj kun "besteco" aŭ "aĵeco" (ekz. "tio" aŭ kelkaj derivaĵoj de "-aĵ-"), oni uzas tiun ĉi argumenton ĉefe nur en la kazo de la pronomo, sed ne en la aliaj.

Se iu ofendiĝus pro tio, ke mi parolus pri tiu persono kiel pri ĝi, tial ĝi devus ofendiĝi ankaŭ en kazo kiam mi parolas pri ĝi kiel pri "estaĵo". Sed tio apenaŭ okazas. Mi ŝatus vidi personon, kiu ofendiĝus se mi dirus al ĝi "Vi estas la plej bela estaĵo, kun kiu mi iam dancis." Simile Donald HARLOW en Esperanto skribis "Ho! ŝi estas la plej bela estaĵo, kiun mi iam ajn vidis!" en sia traduko de Fiereco kaj antaŭjuĝemo de Jane AUSTEN. Simile E. W. AMOS en sia traduko de Lando de Blinduloj skribis: "sed Nuñez komence opiniis ŝin bela, kaj baldaŭ la plej bela estaĵo en la tuta mondo." Tiam la koncernaj personoj ja havu pli da rajtoj ofendiĝi, ĉar oni ne nomas ilin "ĝi" sed rekte "estaĵo". Vivanta, sed tamen aĵo.

Alia kontraŭargumento estas tiel nomata argumento per neuzo. Tiaj homoj diras: "jes, tio veras, vi povas uzi la pronomon "ĝi", sed preskaŭ neniu uzas ĝin, do tio ne estas bona solvo." Tia argumento iĝas absurda kiam ni konscias, ke tia homo fakte diras, ke ĉar neniu uzas ĝin, ne indas eĉ informi aŭ strebi pri ĝia uzo, sendepende de ĝiaj veraj ecoj. Tiam argumenton mi povas ja uzi kontraŭ ĉio, kio estas nova aŭ malmulte konata aŭ uzata. Tiu, kiu kredas topn, do ankaŭ devus konfesi ke ne indas strebi pri disvastigado de Esperanto, ĉar kompare kun aliaj lingvoj, ĝi estas apenaŭ konata kaj parolata (ne parolante pri aliaj lingvoj, eĉ naturaj). Rezulto de tia argumento estos nur unu – daŭra nescio kaj neevolado.

Unu plia kontraŭargumento diras, ke nediferencado inter personoj aŭ individuoj kaj aĵoj en tria persono de singularo estas nenatura por multaj homoj pro influo de iliaj denaskaj naciaj lingvoj. Tio certe validas, kaj certe tio estas kazo de ĉiuj el la kvin fundamentaj lingvoj. Sed ankaŭ la nuna stato, kiam oni diferencas inter personoj kaj aĵoj, estas nenaturaj por multaj parolantoj de lingvoj kiel la hungara, la turka aŭ la indonezia, kiuj ne havas tiun diferencon. En kazo de triapersona plurala pronomo ŝajnas, ke homoj sufiĉe bone akomodiĝas al la sistemo de unu ĝenerala pronomo sufiĉe bone eĉ se ilia denaska nacia lingvo distingas genrojn tiakaze (ekz. en la ĉeĥa, la slovaka, la pola, la kataluna, la itala aŭ la araba).

Fine mi povas provi priskribi kial mi opinias, ke markiteco de homeco aŭ personeco ludos malpli gravan rolon ol antaŭe.

Pro la teĥnika evoluo kelkajn rolojn de individuoj povos esti bone prizorgataj ne nur per homoj, sed ankaŭ per programoj kaj aĵoj. En komputila sekureco ofte la atakanto al komputila sistemo ne estas rekte homo aŭ grupo da homoj, sed nur programo. Tion vi kompreneble ne devas scii je la flanko de atakato kaj tiam la markiteco de homeco ne havas sencon. Uzo de nura "ĝi" en tia situacio estas ne nur gramatike ĝusta, sed ankaŭ komforta kaj oportuna kompare kun malpli oportuna kaj pli komplika "li aŭ ĝi", "li aŭ ŝi aŭ ĝi" aŭ eĉ "ri aŭ ĝi". Anstataŭigo de similaj vortumoj estis unu el la kialoj por riismo, do kial denove enkonduki similan staton, nur ĉe alia eco?

En praktika vivo de nekomputilistoj vi povas trovi helpajn babilejojn ĉe kelkaj retejoj, sed uzante ilin vi ne nepre devas scii ĉu vi skribas kun vera homo aŭ kun programo. La babilaj programoj iĝas

pli kaj pli kapablaj kaj pli kaj pli homŝajnaj. Nur komparu hodiaŭan staton kun la stato antaŭ 20 jaroj kaj provu imagi la staton post sekvaj 20 jaroj.

Kio estas ankaŭ prisilentata en la diskutoj pri neŭtrala triapersona pronomo estas la fakto, ke seksa identeco ne estas la ununura en la mondo eĉ se hodiaŭ ĝi povas esti la plej signifa. Post kelkaj jaroj la situacio povas denove pliriĉiĝi per novaj identecaj problemoj kaj movado. Ŝajnas estis ege oportune, ke per unu ĝenerala (senseksa) triapersona pronomo ni povas la problemon solvi unufoje kaj por ĉiam.

Tiu estonta identeca movado povus esti ekzemple tiu de transhumanismo. Tiu movado strebas pri plibonigo de homa korpo per teĥnologio. Se la movado kaj teĥnologio evoluos (kio estas sufiĉe ebla), oni povas facile imagi, ke aperos ankaŭ individuoj, kiuj ne plu sentos sin kiel homoj nek kiel maŝinoj. Por ili hodiaŭa riismo ne havas solvon, sed ĝiismo havas ĝin. Ekzemplo de tia jam ekzistinta homo povas esti homo FM-2030 (esperantilingva Vikipedio, 2016). Kaj se vi opinias ĝin absurda aŭ fikcia, same certe opinius homoj de Zamenhofa tempo pri transsekseco kaj neduuma sekseco.

Necesas nur rimarki, ke se "ri" estus akceptita per Akademio, ĝi tamen ne forigus ĝisnunajn neŭtralajn esprimmanierojn – liismo kaj ĝiismo, nur aldonus unu plian. Ilian forigon Akademio neniam povus aprobi, alikaze temus denove pri aparta esperantido, ne plu pri Esperanto.

Karesiga postafikso

Estas mirige, ke eĉ la tekstoj de riistoj kaj iĉistoj, kiujn mi havis ŝancon legi, ne substrekas oportunon por havi neŭtralan esprimmanieron ĉe diminutivoj. Unu el la logikaĵoj de iĉismo ja estas ke la postafikso -iĉ- estas bele simetria kun -in- same kiel -ĉj- estas simetria kun -nj-.

Por kazoj kiam necesas karesigi nomon aŭ substantivon sen mencio de ina aŭ vira sekso mi mem proponus belsonan postafikson -sj-, BROSCHE (2015) proponis -rj-. Ĉiukaze la aldono mem ne estas neebla, sed en kazo de diminutiva postafikso ĝi estus unua en la historio de Esperanto.

Konkludo

En tiu ĉi artikolo mi volis montri, ke la "seksa problemo" en Esperanto estas afero de lingvouzo, ke la problemoj havas solvon jam en nuna Esperanto kaj ke tiu solvo ankaŭ estas lingvouza, ne gramatika.

Mi ankaŭ provis klarigi kial laŭ mi ne indas perforte senseksigi ĉiujn radikojn en Esperanto kiel estas proponata de la origina iĉismo, ĉar la aro de "problemaj" vortoj estas sufiĉe malgranda kompare kun la ŝanĝo mem kaj, ke tiujn apartajn vortojn eblas solvi alimaniere – ĉefe per elprenado de novaj sekse neŭtralaj ekvivalentoj.

La plej malfacila parto verŝajne estis klarigi kial mi vidas oportune uzi la pronomon "ĝi" kiel ĝeneralan triapersonan singularan pronomon. Fine mi aldonis mallongan proponon pri sekse neŭtrala diminutiva postafikso.

Kiel do esprimiĝi neŭtrale?

- Evitu -in-, vir- aŭ -iĉ- kiam ne necesas, preferu sekse neŭtralajn radikojn kaj vortojn.
- Uzu "ĝi" kiel ĝeneralan triapersonan singularan pronomon, evitu "li" aŭ "ŝi" kiam ne necesas.
- Estu afabla

La celo ne estas, ke ĉiuj tuj ekuzu tiun ĉi konkretan neŭtralan esprimmanieron. La celo estas montri alian vojon ol oni proponas en tradicia lingvouzo aŭ pli progresiga riismo kaj iĉismo. Eĉ se la nura rezulto estus racia diskuto pri neŭtralaj esprimmanieroj en Esperanto, la celo de tiu ĉi verko estus plenumita pli ol sufiĉe.

Fontoj

- Grupo de aŭtoroj: Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (1905)
<https://eo.wikisource.org/wiki/Bulonja_deklaracio>
- HAGEMANN, Ole: Egaleco kaj la Internacia Lingvo (1979)
<<http://www.gazetoteko.com/ske/ske00.pdf>>
- KRAMER, Markos: Esperanto kaj sekso (2014)
<<http://lingvakritiko.com/2014/10/16/esperanto-kaj-sekso/>>
- AUSTEN, Jane: Fiereco kaj antaŭjuĝemo
<<http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/Noveloj/fiero/>>
- ZAMENHOF, L. L.: Fundamento de Esperanto (1905)
<https://eo.wikisource.org/wiki/Fundamento_de_Esperanto>
- PK: Kial iĝi riisto (2014)
<<https://egalecen.org/2014/08/04/kial-igi-riisto/>>
- BORMANN, Werner: Kontraŭ seksisma lingvo-uzo (1980)
<<http://www.gazetoteko.com/ske/ske02.pdf>>
- WELLS, H. G.: Lando de Blinduloj (2001)
<<https://git.framasoft.org/AJNOURI/esperantolibroj/blob/master/Lando%20de%20blinduloj%20-%20H.G.%20Wells.md>>
- ZAMENHOF, L. L.: Lingvaj Respondoj (2001)
<<http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20zamenhof,%20l.l.%20-%20lingvaj%20respondoj.pdf>>
- DEL BARRIO, Toño: PLEDO POR LA EVITO DE SEKSISMO EN ESPERANTO (2004)
<<http://www.delbarrio.eu/seksismo.htm>>
- EICHHOLZ, Vilma: Plie pri la komuna pronomo (1980, 1981)
<<http://www.gazetoteko.com/ske/ske08.pdf>>
- WENNERGREN, Bertilo: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (2017)
<http://bertilow.com/pmeg/aldonoj/fundamenta_gramatiko.html>
<<http://bertilow.com/pmeg/vortfarado/afiksoj/kio.html>>
<http://bertilow.com/seksaj_vortoj/index.html>
<<http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/pronomoj/tria.html>>
- QUIRKE, Dermot: Pri lingva seksismo (1986)
<<http://www.gazetoteko.com/ske/ske13.pdf>>
- Grupo de aŭtoroj: Riisma Esperanto (1994)
<<http://web.archive.org/web/20060924123828/http://www.rano.org/riismo2.html>>
- BROSCH, Cyril: Seksa egaligo en la lingvo – laŭfundamente (2015)
<<http://lingvakritiko.com/2015/01/31/seksa-egaligo-en-la-lingvo-laŭfundamente/>>
- Akademio de Esperanto: Statuto de la Akademio de Esperanto (2016)
<<http://akademio.info/akademio/index.php?title=Statuto&oldid=34>>
- Esperantlingva Vikipedio: FM-2030 (2016)
<<https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=FM-2030&oldid=6078102>>